

LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ.

Aperas monate. Jara abono K 6.— (por 10 numeroj). — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. —
Administrejo: Fr. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso
no. 169.352. — Telefono: 732./VI. — La manuskriptojn oni ne resendas.

Richard Levin, Lyon:

SALUTO AL LA LIBERA ĈEĤOSLOVAKIO!

(Responde al la artikolo »Saluto al Francujo«
en la numero de Novembro de 1918 de »La
Progreso«.)

Unue, mi deziras esprimi al la aŭtoro de tiu artikolo kaj, trans li, al la tuta Ĉeĥoslovakio, kiom Francio estas kortuŝata de la certigoj de amo kaj sindonemo kiujn Ĉeĥoslovakio ne ĉesis doni al ĝi, depost sia renoviĝo al Libereco. — Ni, Francoj, estas emociitaj ĝis la plej profunda parto de ni mem, vidante la varmegecon de la sentoj kiujn vi havas por ni. Ho! kia rekompenco belega al ĉiuj niaj penoj por triumfigi en la tuta mondo la ideojn de Libereco, Egaleco kaj Frateco.

Depost nia Granda Revolucio, la franca armeo, ne kontenta esti triumfiginta nur en Francio la rajton de ĉiuj al la Justeco kaj Libereco, verŝis sian sangon tra la tuta Eŭropo por liberigi ĉiujn popolojn, kiuj alvokis ĝin por helpi; depost tiu momento, mi diras, nia lando estis ĉiam la defendanto nelacigebla de la popoloj perfortigitaj; — tiuj, kiuj estis persekutataj de tiranoj trovis ĉiam ĉe ni rifuĝon kaj protekton.

Kaj vi speciale, Ĉeĥoslovakoj, vi, tiom fieraj, kiuj neniam konsentis je via sklaveco, kiuj ĉiam protestis kaj pruvis tiel brile vian vivpovon, vi, la neflekseblaj Ĉeĥoslovakoj, estis por ni fratoj karaj. Ĉu vi rememoras, kiaj varmegaj manifestoj de simpatio salutis viajn famajn »Sokolojn« kiam ili venis Francion? — Estu bone certaj pri tio: ni vin amas kiom vi amas nin.

Bohemio estis ĉiam granda lando. La Germanoj, kiuj vin ĉirkaŭis preskaŭ sur

ĉiuj flankoj kaj estis tiomfoje pli multnombraj ol vi, malgraŭ iliaj paciencaj kaj obstinaj penoj de penetrado dum jarcentoj, neniam sukcesis vin trafenetri, neniam povis malpliigi la gravecon de via individueco. — Ili konkeris vian landon. Ili fariĝis la sinjoroj, la mastroj. — Ili trudis al vi sian lingvon kiel lingvo oficiala. — Tio tute ne malpliigis la forton de via lingvo kiu, ĉe la momento kiam ili kredis ĝin premmortigita, reviviĝis en la plej mirinda maniero, per la plumo de Kolár, Palacký, Šafařík k. c.

Neniam vi akceptis vian subigadon. — Komence de la 15a. jarcento, la ribelo de la partianoj de Johano Hus montris, kiom potenca estis via nacia sento. — Pli poste, frakasitaj per la plimulto en la batalo de la Blanka-Monto, vi devis cedi. — Sed neniam, de tiam, vi perdis la esperon, konstantege fidantaj la pravan rajton de via afero, kaj ĝian triumfon finan.

Kiam eksplodis tiu milito, vi sentis ke la momento decidiga estis veninta, kaj vi decidis fari ĉion kio por vi estis ebla, kaj eĉ pli, por helpi la triumfon de la Justa Afero, kiu estis nepre via afero. —

Mi memoros ĉiam iun okazon, malgrandan en si mem, sed kiu eble vin interesos. — Estis komence de la milito. — Ĉiuj interparolis en la stratoj, en la tramveturiloj, ĉie. — Kaj oni diskutis arde. Iun tagon, en tramo, preskaŭ ĉiuj veturantoj estis eniĝintaj en akra konversacio pri la milito. — Subite, iu junulo ekkriis: »Jes, sed ni havas la Ĉeĥojn por ni!« kaj lia vizaĝo esprimis ke »havi la Ĉeĥojn por si« ne estis neŝatindaĵo! — Mi estis 18 jara tiam, mi estis frapita de tio, mi ĉiam ĝin memoris, kaj mi povis kontroli, poste, kiom tiu junulo estis prava. —

De tiu momento, ĉio kio rilatis Ĉeĥojn min interesis multé. Kun kia admirado mi vidis ilin, malgraŭ la persekutoj kaj la malfacilaĵoj eksterordinaregaj, forkuri de la aŭstria armeo en kiu ili estis rekrutigitaj perforte, kaj veni unuj ĉe la fronto rusa, aliaj ĉe la fronto itala, kaj aliaj ĉe la fronto franca, formi kontingentojn kiuj batalis tiel arde kaj tiel kuraĝe, ke ili admirigis niajn »poilus« kaj ke ilia reputacio disvastiĝis baldaŭ tra la tuta mondo.

Kaj nun, ni estas venkintaj! Vi estas liberaj! Se iam homoj meritis bone sian liberecon, estas ja vi, Ĉeĥoj, ĉar vi pagis ĝin per via sango, per viaj suferoj.

Saluton! Bohemio libera! Per sia tuta koro, per sia tuta animo, Francio krias al vi: »Estu bonvenanta inter ni!« — Francio etendas siajn brakojn al vi, Bohemio, kaj vi vin ĵetas ame en ili. —

»La paco kiu liberigas Bohemion estas franca paco« diris antaŭ nelonge nia ministro Pichon. —

Rigardu! Ĉe l' horizonto, nun klarigita, ni ekvidas epokon de frateco kaj feliĉeco al kiu ĉiuj niaj penoj devas celi. —

Same kiel niaj soldatoj, ĉeĥaj kaj francaj, dum la milito batalis en la tranĉeoj, flanke ĉe flanke, kontraŭ la barbara malamiko, tiel en la paco ni laboru, penu, batalu, flanke ĉe flanke, kontraŭ la malbono, la senklereco, la mallumo, k. c., por la fina triumfo de Rajto kaj Vero!

Francoj kaj Ĉeĥoj, mano en mano, antaŭen!

KIAL LUKTIS BULGARIO?

Tute ne por ia »hegemonio« sur la Balkano kaj ne por helpi al la Germanoj kaj Aŭstroj sangumis Bulgario, ĝi ne volis ian superecon, nek ĝi kontestis la rajton de aliaj. Ĝi estis por Makedonio — la lulilo de l' bulgarismo — kaj por Dobruĝa — la ĝermo de l' bulgarismo — ke tiu malfeliĉa lando estis devigita levi la glavon, post kiam ĝi vane petis la recedon de siaj teritorioj. Ĝia historio mem estas lukto de 12 jarcentoj por la nacia unuiĝo.

Post ĝiaj suferoj kvincentjaraj sub duobla jugo — politike sub la Turkoj, religie sub la Grekoj — oni kripligis la landon de kvinmiliono popolo sur la duoninsulo kun tia glora pasinteco, popolo, kiu donis la kristanismon kaj la slavan alfabeton al siaj kunfratoj kaj najbaroj norden kaj ok-

cidenten, popolo, kiu jam en la X. jarcento havis sian Luther, Calvin kaj Savonarola en la personeco de popo Bogomil la autaŭiranto de l' senmorta Majstro Jan Hus, popolo, kiu jam tiam aŭskultis la Dian parolon en la propra lingvo... Oni kripligis la ĵus liberigitan per tiom da rusa sango »San Stefana Bulgaria« en la Berlina kongreso en 1878, kie oni donis la nordan Dobruĝa al la Rumanoj (interŝanĝe de Besarabio, kiun prenis la Rusoj), la valon de Morava al la Serboj, kaj Makedonio estis denove ĵetita sub la turkan jugon. Tion faris la Eŭropa kristana diplomatio sub preteksto, ke la bulgaroj fariĝos rusaj agentoj... kaj en 1913, post la balkana milito anstataŭ kunagi ke ĉiu popolo sur la Balkano ricevu la sian kaj proponi la fondon de komuna balkana ligo profite de l' Entento, tiu ĉi deziris ĝin krei en malprofito de Bulgario. Nur tiamaniere oni povas klarigi al si la miksiĝon de Delcassé, tiama franca ambasadoro, en la pure hejmajn slavajn aferojn kaj lian proponon ke Bulgario estu dividita definitive inter Grekoj kaj Rumanoj. Kaj tiel en 1913 oni lasis forpreni al la Bulgaroj la fruktojn de iliaj venkoj, dividi la vivantan korpon de Bulgario, permesi la traktaton de Bukareŝto. Oni lasis la Bulgarojn ĵus liberigitajn de unu jugo — iri en alian ankoraŭ pli teruran; oni permesis, ke ili estu persekutataj, ekstermataj, denaciigataj... Oni krucumis tiam tutan popolon kaj preskaŭ neniu diris ion.

Kaj kiu tiam volis la hegemonion sur Balkano? Ĉu Bulgario, kiu postulis nur tion, kio apartenis al ĝi laŭrajte? Aŭ ĝiaj najbaroj subtenataj de la sama diplomatio, kiu nun kulpigis la Bulgarojn, ke ili estas ne plu rusaj, sed germanaj agentoj?!?!

En la komenco de la tutmonda milito Rumanoj kaj Grekoj, tiel malavare rekompencitaj per bulgaraj teritorioj, estis invititaj partopreni ĉe la flanko de l' Entento, sed la unuaj pretekste de alianceco kun Aŭstrio, aliaj pretekste de dinastia parenceco kun Germanio, rifuzis. Tiam s-oj. Sazanov kaj Delcassé, jam eksterlandafera ministro, rememoris je Bulgario kaj proponis al ĝi la sendisputan zonon en Makedonio kondiĉe, ke tiu okupu ĝin post la milito... Eĉ la Francoj ne kredis, ke la politiko de Delcassé certigos al ili venkon, kaŭze de kio li falis. Bulgario devis trakti kun aliaj homoj, kiuj amis samtempe

Francion kaj Bulgarion, kaj multaj rekonas — eĉ Francoj, ke se la Entento kondukus pli bone sur la Balkano, Bulgario neniam militus kontraŭ ĝi.

Multfoje trompita kaj disrevita de amikoj kaj bondezirantoj, tiu ĉi tiel ĵaluzata kaj kalumniata popolo — kies bonajn ecojn la tuta konscia mondo rekonis — nur profitis la okazon kaj remilitante kvaran fojon por la sama celo nur kontraŭ siaj najbaroj, ĝi sukcesis fine realigi sian idealon, sian nacian unuiĝon, liberigi kaj re-unuigi al la trunkpatrio la bulgarajn provincojn. Despli, ke eĉ ĝia geografia situacio ne permesis al ĝi resti pasiva kaj ĝi ne volis havi la sorton de Grekio kaj Rumanio. Tiel almenaŭ ĝi estis logata de siaj gvidantoj, ĉar bedaŭrinde nenie la popoloj gvidas sian eksteran politikon, nenie ili estas demandataj. Kaj kiam Bulgaroj en 1917 rimarkis, ke Germanoj ekfavoris Rumanojn pri la norda Dobruĝa, ke ili instigis la Turkojn pri la valo de bulgara Marica, ili komprenis, ke ilaj grandaj aliancanoj estas nemalsimilaj al iliaj malgrandaj el 1913 kaj kiam en 1918 en la militon sin enmiksas Ameriko kun la 14 punktoj de Wilson, kiam la bulgaraj soldatoj en la tranĉeoj legis pri tiuj principoj, ili tie rekonis la siajn, sentis neutilon de plua sangverŝado kaj estante instigataj de ĉiam kreskanta mizero, forĵetis la pafilojn bedaŭrante, ke tiu enmikso ne venis tuj en komenco de la milito.

Al ili estis tamen destinate eltrinki ĝisfunde la maldolĉan glason. Ili kapitulaciis lasante la sorton de malfeliĉa patrujo en la manoj de Dio kaj Wilson. Nun blokitaĵ de la registaroj de la Entento, kiuj ne lasas ilin defendi sian justan aferon, ili perdas esperon je tiuj principoj.

Kaj vere, nun, kiam oni tiel multe parolis pri la rajto de la popoloj kaj pri aliaj belaj aferoj kiel: libereco, demokratio ktp., kiam oni liberigis Polojn, Ĉeĥoslovakojn, Jugoslavojn ktp., kial ne permesi aŭkaŭ unuiĝon de popolo tiel subpremita en la estinteco, kiu deposedis sian partan liberiĝon en 1877 ĝis la kapitulacio apud Cerna-rivero en la pasinta aŭtuno ne ĉesis lukti por la samaj principoj, pensante pri siaj malfeliĉaj fratoj en Makedonio kaj Dobruĝa, por kies liberigo ĝi faris tiom da oferoj kaj verŝis tiom da sango?

La Bulgaroj scias, ke iliaj slavaj, precipe la ĉeĥoslovakaj kunfratoj kun premita

koro sekvis ilian konduton dum la mondmilito, sed se ili ne povis penetrigi sian rigardon en la mallumajn vojetojn de la balkana politiko, ili nur pripensu siajn proprajn disputojn kun siaj polaj kunfratoj, kaj ili komprenos iom tiujn inter la du aliaj slavaj najbaroj — Bulgaroj kaj Serboj. Ili tamen ne suferis la premon de la atmosfero, kiu venenis la bulgaran popolon, tial ili ĝis nun ne komprenis, ke estis eĉ momentoj, kiam la Bulgaroj estus ilianciĝintaj eĉ ku la diablo, nur por atingi sian idealon tiom da fojoj piedpuŝitan!

La milito finiĝis, multaj slavaj popoloj reviviĝis. La bulgara popolo, kvankam ĉe la ŝultroj de tiuj, kiuj sopiris perforton kaj potencon, tamen ankaŭ batalis por sia justeco. Ĉu tion komprenos ĝiaj pli feliĉaj slavaj fratoj? Se estas vere ke la ideo de slavismo estas humaneco, frateco, senlima amo, paciĝo, proksimiĝo kaj interpardono, ili certe ĝin komprenos.

Zlatá Praha denove fiere disvolvos la standardon de l' slava mondo La Bulgaroj sentas tion, deziras tion, kuros al tio. Ili tiel ŝatis kaj ŝatas siajn ĉeĥajn fratojn. Ili ne malfruiĝos viciĝi kun ili en la nova slava mondo.

Kaj tiam realiĝos la revo le Kolár: la slava mondo — frata feliĉa paradizo, sen mallumo de maljusto kaj malkontento, lumigata de la radioj de varma amo, amo ne nur al siuloj, al Slavoj; sed ankaŭ al la tuta homaro. Ivan H. Krestanov.

GERMANAJ TEKSISTOJ.

De Henriko Heine.

En senlarma okul' kaŝante la sentojn,
Ili sidas kaj teksas kaj grincas la dentojn:
Ho Germanuj, ni teksas kun pen'
Morttukon al vi kun triobla malben' —
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al diaĵo, al kiu kun preĝo
Turniĝis en frosto, malsato kaj neĝo
Ni kaj atendadis en vana esper'...
Ĝi mokis kaj ridis je nia mizer' —
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al la reĝo, la reĝo de riĉaj,
Senkora vampiro por ni malfeliĉaj:
Senigis li nin de lasta la mon',
Nun oni nin pafas laŭ lia ordon' —
Ni teksas, ni teksas!

Malben' al falsa la patrolando,
Kie regas tiaj vampiroj en bando,
Elsuĉas vivsukojn el ĉiu jun-flor',
Protekt' nur al vermoj, putraj', malhonor —
Ni teksas, ni teksas!

Ekkrakas teksilo, ekflugas ŝipet',
Ni teksas sen ĉes', kun la mort' pro l'vet' —
Maljun-Germanuj', ni teksas kun pen'
Morttukon al vi kun triobla malben'.

Ni teksas, ni teksas!

El la germana lingvo esperantigis
Dr. Emil Pfeffer.

Jindř. Wurmová:

LA SUPOZOJ DE DAŪRA PACO.

Se ni observas la evolucian de pacifismo de la plej antikva tempo, ni vidas, ke en ĝi valoriĝas diversaj devizoj, per kies efektiviĝo oni promesas al la homaro eternan pacon. La plej malnova tia supozo estas la ideo pri paciga juĝantaro kaj pri pacigaj traktatoj. Kun paciga traktato kiel la plej antikva diplomata akto ni renkontiĝas jam ĉe Egiptanoj en la tempo de la reĝo Ramso 11. (1396-1323 jarojn antaŭ Kristo) kiam inter ili kaj la Hetitoj estis interkonsentita »eterna paco« kaj arma ligo kontraŭ la malamikoj.

La plej malnova paciga juĝantaro estis la malnovgreka ligo Amfiktionio, kiu apud religiaj taskoj kompromisis pacamaniere ankaŭ konfliktojn inter la gentoj.

En la verkoj de nia Komenský ni renkontas tiun ĉi proponon disvastigitan jam je ĉiuj kristanaj nacioj kaj la sekto de kvekroj deveninta el la ekzemplo de nia »Jednota Bratrská« (Frata Unuiĝo), akceptas la devizon pri paciga juĝantaro en sian religian programon kaj ĝi venas post la Napoleonaj militoj el Ameriko Eŭropon por organizi tie ĉi la pacan movadon.

Tiuj klopodoj ekkulminaciis en nia tempo per Haagaj konferencoj, kies celo estis la starigo de internacia paciga juĝantaro.

Alia devizo de paca movado estis la devizo: For la batalilojn, kiun la paca batalantino Berta de Suttner, la unua organizintino de paca movado en la estinta Aŭstrio enskribis sur sian ŝildon. La ideon de ĝenerala senarmigo rekomendis ankaŭ tre akcente la angla delegito Fry en la dua haaga konferenco, sed la germanaj delegitoj ĝin absolute kontraŭstaris. Same la klopodo de Lloyd George, kiu nomis la senĉesan vetarmigadon de la ŝtatoj »organizita frenezaĵo«, restis en tiu direkto sen sukcesa.

Sed proksimume dek jarojn antaŭ la milito ekkomencis modernaj pacifistoj propagandi novajn devizojn: Forigu la interŝtatan anarhion! Organizu la mondon! Per tio ĉi oni komprenas fundamentan reformon de la internacia rajto, kiu kondukus al interŝtata konvencio kaj organizacio de ĉiuj ŝtatoj en unu grandan korpuson, do en la formon, kiu nun post la teruraj spertoj de la mondmilito estas starigonta, nome: la »Ligo de la Nacioj«. La malmara estus natura konsekvenco de tiu ĉi ligo.

Eĉ tiu ĉi devizo baziĝas per siaj radikoj jam en la delongtempa pasinteco. Ĝi estis nia bohema reĝo Jiří el Poděbrady, kiu en la jaro 1462. provis krei ligon de eŭropaj ŝtatoj kiel ligon de paco kaj cent jarojn post li la sama projekto de la hugenota reĝo franca, Henriko IV. nuliĝis pro kontraŭstaro de Aŭstrio.

Poste en la duono de la deknaŭa jarcento ĝi estas la franca verkisto Viktoro Hugo, kiu per flamaj vortoj predikas la ideon de »Unuigitaj ŝtatoj eŭropaj.«

La diferenco inter tiuj ĉi proponoj de la estinteco kaj la nuna de la prezidanto Wilson proponita Ligo de la Nacioj estas, ke ĝi rilatas ĉiujn kulturajn ŝtatojn de la mondo kaj ĝi estas provizota per detalaj ekzistencaj kondiĉoj konvenaj al la spirito de la epoko.

Estas la demando, ĉu la paca konferenco trovos la ĝustan bazon, kiu garantius la plenumon de la esperoj en tiun ĉi ligan metitaj.

La Ligo de la Nacioj laŭ la projektoj de la ŝtata sekretario amerika, Brian, estas disponanta ekzamenan komision, kiu pli longan tempon detale esplorus ĉiun konflikton, komenciĝintan inter la ŝtatoj. La konfliktojn de jura karaktero ĝi prezentus kun siaj proponoj al la konstanta paciga kaj arbitracia juĝantaro, se la konflikto koncernus nur la malsamajn interesojn de la ŝtatoj, ĝi estus prezentita al la paciga konsilantaro, konsistanta el neutralaj partoprenantoj, kiu poste raportus sian bontrovon al la forumo. Per la prokrastado mem perdis jam la konfliktoj sian severan karakteron kaj se tamen iu ŝtato ne volus cedi kaj postulus perfortan solvon — do la militon — ĝi devus timi la bojkoton de la aliaj ŝtatoj, kiel ankaŭ la ekzekutivan devigan potencon, per kiu disponus la Ligo de la Nacioj.

Sed multe pli celrafe estus akcepti la proponojn de doktoro de internacia rajto Fr. Weyr el Brno, kiujn li kiel komitatano de »Jednota Mirová na Moravě« (Paca Unuiĝo en Moravio) prezentas en la petskribo de tiu ĉi asocio, difinita al la paca konfe-

renco, nome, ke la Ligo de la Nacioj estu provizota per leĝodonanta konsilantaro, kies normoj kaj leĝoj estus fundamento por la paciga juĝantaro kaj kiujn neniu en ŝtata parlamento rajtus nuligi, kiel ankaŭ per ekzekutiva deviga potenco, kiu estus tiamaniere formita, ke la apartaj ŝtatoj posedus armean potencon nur kiel polican potencon por la ŝtataj bezonoj, dume la Ligo de la Nacioj rajtus disponi per tiuj ĉi korpusoj kiel per komuna internacia armeo.

Sed apud tio ni ne devas forgesi, ke laŭ la vortoj de la amerika politikisto Elihu Root, eĉ la plej malgranda konflikto povas kaŭzi militon, se estas la intenco militi kaj la plej granda povas esti pace solvita, se ekzistas bona volo por paco.

El tio ĉi rezultas, ke, se estas garantiota la trankvilo kaj la vera harmonio inter la ŝtatoj, devas esti kreita tia ŝtato, ke neniam konfliktoj naskiĝu, aŭ ke eĉ la malgrandaj ne atingu terurigan situacion.

Tio supozas, ke ĝi povas esti nur ligo de la demokrataj ŝtatoj, garantiantaj al ĉiuj nacioj de apartaj ŝtatoj egalajn rajton kaj la memdestinan rajton, kiu nur en demokrata ŝtato ne povas kaŭzi konfliktojn kun monarĥiaj interesoj, je kiuj ĝis nun nuligiĝis ĉiu pacifisma laboro.

Sed se estas unuigitaj nacioj vivontaj pli indan, pli feliĉan kaj pli konkordan vivon, devas tie ĉi ekzisti laŭ nia opinio ankoraŭ unu supozo. Nome, ili devas esti kunigitaj ne nur per eksteraj normoj kaj leĝoj, ne nur per sia ekzekutiva kaj deviga ĝenerala potenco, sed ankaŭ per interna ligilo, influanta ilian vivon, liganta eĉ iliajn spiritojn kaj koron. Ili estas posedontajn apud la konservado de nacia individu-eco komunajn kontraktajn punktojn, sopirojn, interesojn kaj celojn.

Por tiu ĉi celo devas esti la internaciaj interrilatoj pli intensivaj ol antaŭ la milito kaj tio en ĉiuj direktoj, ĉu sur la kampo ekonomia, komerca, scienca, humana, industria, transporta kaj sim., ĉe kio netaksebla helpilo estus la aprobo de iu lingvo kiel interkompreniga mondlingvo.

Ankaŭ estas tre grave, ke la paca konferenco enkonduku unecan edukadon de la junularo. Absolute ne estus rekomendinde, ke unu ŝtato edukadu la junularon laŭ paca spirito kaj la alia laŭ perforta spirito. Nova epoko postulas novajn homojn, kiuj nemalhelpite povus dediĉi sin al novaj, grandaj taskoj, al komuna laboro je superigo de la morala grado de la homaro, kiu tiom profunde malleviĝis kulpe de la milito.

Estas necese formadi firmajn karakterojn, sed sur la bazo de nobla interfratiĝo

de la homaro kaj de Kristo predikita amo al proksimulo kaj al ĉiu kreitaĵo.

^ Nur per la amo renaskiĝos la mondo kaj leviĝos per la milito sensentiĝinta kaj maldelikatiĝinta animo.

PRI LA SAĤARINO.

Rudolf Petr, Klatovy.

La eltrovinto de saharino, dro. Konstantin Fahlberg dankas sian valoran eltrovon nur al favora sorto. Li revenis dum iu junia tago en la jaro 1878. el la universitata laborejo de profesoro John Hopkins hejmen kaj lasis en sian loĝejon alporti tagmanĝon, kiu al li post klopoda, taga laboro bone gustis. Sed li estis tre surprizita pro frapante dolĉa gusto de la pano. Post mallonga pripensado li baldaŭ certigis, ke liaj freŝe lavitaj manoj transportas ĉi tiun dolĉecon. Ĝi povis sole tiel okazi, ke li kunportis siajn dolĉajn manojn jam el la laborejo. Li kuris do rapide returnen kaj gustumadis tiel longe la enhavon de ĉiuj tinetoj, glaso kaj pladetoj, ĝis li fine trovis la ujon, kiu havis ĉi tiun dolĉan guston. Tiukaze aperigis Fahlberg sulfinidon de la acido benzoika aŭ saharinon, kiu estas universale konata surogato de la sukero. Pogrande oni fabrikas ĝin de la jaro 1886 en fabrikoj el tolnolo, kiu estas karbohidrogeno el la nigrokarba gudro, kaj havas treege dolĉan guston. Ĉi tiun guston oni povas konstati ankoraŭ en la solvaĵo 1 : 70.000. Laŭ sia pureco estas saharino 300—550 foje pli dolĉa ol sukero kaj tial ĝi fariĝis pro sia malmultekosteco serĉata surogato de sukero. Ĝi atingis baldaŭ en la sukeraĵfabrikado, bierfarejoj, en fabrikado de likvoroj, vino k. t. p. larĝan uzadon. Sukeron ĝi kompreneble ne povas kompensi ĉar ĝi havas nenium nutran valoron.

ĈEĤOSLOVAKIO.

Publikaj bibliotekoj. Laŭ la leĝo no. 430 kaj la registara ordono no. 607/1919 ĉiu Ĉeĥoslovaka komonumo devas fondi publikan bibliotekon, alireblan de ĉiu loĝanto. La § 1. de la leĝo ordonas: »Por kompletigi kaj profundigi la klercon de ĉiuj klasoj de la loĝantaro la politikaj komunumoj fondadu publikajn bibliotekojn kun legajo kleriga, instrua eĉ amuza, kiu havas veran internan valoron«. § 2. »En la politikaj komunumoj kun naciaj minoritatoj estu fondita eĉ por la minorito aparta biblioteko, se la minorito, havas almenaŭ 400 personojn laŭ la lasta popolsumigo.« — Libroj

senvaloraj, nemoralaj (pornografiaj), detektivaj, kiuj per sensacia maniero instigas fantazion de la legantoj, pamfletoj, kiuj tendence malaltigas tutajn klasojn de la loĝantaro, verkoj celantaj kontraŭ la ekzisto kaj sendifektado de la Ĉeĥoslovaka respubliko estas malpermesitaj. La registara ordono destinas, ke la komunumoj kun pli multe ol 400 loĝantoj, kie almenaŭ popola lernejo jam ekzistas, devas fondi la bibliotekon laŭeble tuj, sed plej malfrue ĝis 31. decembro 1920, la komunumoj pli malgrandaj ĝis 31. dec. 1921. Tiuj, kiuj ne havas pli ol 300 loĝantojn ĝis la 31. dec. 1929. Minimuma komenca nombro de la libroj estas 50. (Kiu interesiĝas pri la detaloj aŭ pri aliaj leĝoj ktp. de la Ĉs. respublika komunumo devas fondi publikan biblioteko, skribu al So. JUDr. Jos. Fousek, advokato en Přelouč, Ĉeĥoslovakio, kiu siavice petas informojn pri interesaj »de lege ferenda« en aliaj statoj.

VII. Ĉiusokolara Kongreso okazos en junio 1920 en Praha. Ĝi estos ne nur kutima festo sokolara, sed granda kampa ekzercado de la ĉefaj gimnastikistoj, kiuj en la liberigita lando ludas rolon landdefendan. Oni atendas trel grandan partoprenon, ke estas necese ŝanĝi la internan organizadon de la kongreso. La membroj de Sokol loĝos dum la kongrestagoj en grandaj tendaroj en proksima cirkaŭaĵo de Praha. En la tendaroj estos lokumitaj kujejoj, por kiuj la urbestro de Praha donos kaldronojn kaj hejtajn. Ĉar la grandegaj tribunoj nesufiĉas por akcepti la multnombrajn ĉeestantaron (nur el Ameriko oni atendas 50.000 gastojn!), ne estos permesite al la ne ekzercantaj membroj de Sokol okupi la lokojn sur la tribunoj. Ili povos partopreni sole la matenajn ekzercprovojn.

La karbomanko grave malutilas la ekonomian vivon en la tuta respubliko. Ne nur, ke pro tiu ĉi kaŭzo oni devas fermadi lernejojn, sed eĉ multaj fabrikoj jam ekhaltis sian produktadon. Tre ofte okazas, ke eĉ la vagonaroj stariĝas sur la reloj, ĉar pro malbona kvalito de la uzata karbo estingiĝas la fajro en la lokomotivoj. Rilate la karboaprovizado estas la stato de la lando tre danĝera, tiam pli, ke eĉ la publika vivo pro tiu kaŭzo ĝenerale suferas.

Miksajoj. La konata kanonfabriko »Skodawerke« (Škodovy závody) en Plzeň estis ĵus lege registrita sub la nova nomo: »Akcia societo, antaŭe Skodawerke en Plzeň.« Ĝi estas registrita en bohema, franca, angla, germana, rusa kaj serbo-kroata lingvoj. — La urbaj elektro-entreprenoj en Praha havis en la jaro 1918 3,000,000 Kronojn da gajno; en la nuna jaro ili havas 2,900,000 Kr. da deficitado. — Social-demokrata partio fondas en Praha sindikatan bankon kun la kapitalo da 30,000,000 Kč. La aferon gvidas la konata soc. dem. deputito Dro. Soukup. — La germana ĵurnalo »Tagblatt« en Praha esprimis supozojn pri la nova konstelacio de la Nacia Parlamento de post la ĝenerala balotoj, kiuj versimile okazos en Marto. Laŭ ili havas Ĉeĥoj 152, Slovakoj 41, Magiaroj 14, Germanoj 81, Poloj 6 kaj Karpatrusoj 3 deputitojn. Sekve kontraŭ 193 deputitoj ĉeĥoslovakaj staros 104 membra minorito de aliaj nacioj. Sed tiel okazos nur, se la lo-

gantaro balotos laŭ la konkludoj de »Tagblatt«. — Poŝta kaj Telegrafa Ministerio mendis ĉe enladaj firmoj 100 grandegajn aŭtobusojn por transportado de personoj kaj pakajoj. Ili estas destinitaj por la regionoj, kie ĝis nun ne ekzistas fervojoj, ĉefe por Slovakio.

* DIVERSAĴOJ. *

XI. Universala Kongreso de Esperanto. La Konstanta Komitato de la Kongreso post traktado kun la hagaj esperantistoj decidis, ke la XI. Universala kongreso de Esperanto okazos en Haag.

Esperanto ĉe la Foiro de Lyon. Kiel en 1917 kaj en 1918, la Esperanto-Oficejo de Lyon direktata de Sino. Farges, organizis je la nomo de U. E. A. ĉe la aĵtuna kunveno de la Foiro de Lyon propagandan ekspozicion (budo 13 grupo 52.), kiun vizitis centoj da komercistoj kaj industriistoj el ĉiuj landoj. La dokumentoj pri la servoj de U. E. A. precipe por turismo kaj komerco tre impresis la publikon. Simila ekspozicio estos organizata ĉe ĉiuj kunvenoj (printempa: 1. — 15. Marto, kaj aŭtuna: 1. — 15. Oktobro) de la Foiro. La komercistoj kaj industriistoj, anoj de U. E. A., estas petataj sendi al ni specimenojn de katalogoj kaj prospektoj en Esperanto, kaj ankaŭ disdonotajn reklamojn en nacia lingvo (speciale en Franca) kiuj informas ke ilia firma uzas Esperanton kaj U. E. A. La Foiro de Lyon aliĝis kiel Esperantia Entrepreno. Ni petas, ke ĉiu aliĝonto an vizitonto de la Foiro, skribante al la Komitato de la Foiro, sin rekomendu per U. E. A., kaj samtempe informu pri siaj intencoj la Deleĝiton en Lyon, Sr. Poncet, en la Esperanto-Oficejo, 36, rue Victor Hugo, kiu, helpata de la Konsuloj kaj Sub-deleĝitoj, faros ĉion eblan por faciligi kaj pliprofitigi ilian entreprenon.

El U. E. A. La Centra Oficejo de Universala Esperanto Asocio sciigas, ke kaŭze de grava plikarigo de ĉiuj preslaboroj, eĉ pro grandaj kurzdiferencoj estas devigata plialtigi la abonprezon por »Esperanto« kaj la membran kotizadon por U. E. A. La abono por »Esperanto« kostas de nun 24.— Kronojn ĉeĥoslovakajn, aŭ 60.— Kronojn aŭstriajn. La abono kune kun la membra kotizado kostas 30.— Kr. ĉs., aŭ 75.— Kr. aŭstr. La diferenco inter la »luksa« kaj »simpla« eldono de »Esperanto« estos forigita. — Ni esperas, ke malgraŭ la plikarigo truditaj de cirkonstancoj, la ĝisnunaj abonantoj kaj membroj restos fidelaj al tiu ĉi nia plej grava institucio.

Konkurso de B. A. E. La premiinto en la konkurso de la Ekzamenata komisiono de B. A. E., pri kies rezultato ni raportis en la 8.—9. numero de »La Progreso«, estas F. Sidonje Dlouhá, sekretariino de la Rondeto de Esperantistoj en Praha. Ni sincere gratulas la fervoran propagandantinon pro la pruvo de sia bonega scio de la esperanta stilo.

Kio estas kun nia centro? Jam antaŭ du jaroj oni komencis trakti pri la fondo de nova centra asocio de bohemiaj esperantistoj, oni eĉ faris de tiu tempo kelkajn paŝojn antaŭen (la antaŭe malamikaj Klubo kaj Societo en Praha kuniĝis, oni ankaŭ fondis t. n. Konstantan

komitaton de Boh. Esperantistoj, sed de kelkaj monatoj la afero denove ekdormis. La konstanta Komitato ne donas signon de vivo kaj la bohema esperantistaro ĉi tiun aferon tute ne atentis. Ĉu efektive la demando de komuna centro estas en nia lando per la antaŭjaraj bataloj tiom diskredigita?

Oficialaj aproboj de nia laboro. La urba reprezentaro de Plzeň nomis sojn. B. Tittl, red. de »La Progreso« kaj Jos. Pech, prezid. de Laborista Societo Esp. en Pzeň membrojn de Urba Fremdula Komisiono. La nove fondita komisiono zorgos pri akcelado de fremdula movado kaj la du samideanoj prizorgos ĉefe eksterlandan propagandon. — Nia Ministerio por Eksterlandaj Aferoj invitis nian redakcion al kunlaboro kune kun ĝia Sekcio por politika kaj ekonomia informado. — La Presa sekcio de la Ministerio por popola provizado esprimis dankon al nia red. so. B. Tittl por lia eksterlanda informado.

Redakcia leterkesto. Al. So. Illing en Wien: Ni ne okupos nin plu per Viaj ŝovinistaj atakoj kontraŭbohemiaj. Vian leteron ni jetas en la korbon.

KRONIKO.

Plzeň. Esperantista klubo festos en monato februaro la 15. jaran jubileon de sia ekzisto. — Ligo de komercaj helpantoj aranĝas por siaj membroj kurson de Esp. Instruas so. Interholzinger.

Plzeň-Škvřiny. Tie ĉi okazas kurso de Esp., kiun partoprenas 36. personoj. Instruas so. B. Tittl.

Plzeň-Doudlevec. Esperantista klubo aranĝas kurson de E. Instruas so. Pech.

Klatovy. Esp. kurso komencis la 3. nov. en burĝa lernejo. 52 personojn instruas tie ĉi so. Rud. Petr. La kurso komenciĝis per parolado: »Pri la problemo de la lingvo internacia, deveno de Esp. kaj ĝiaj sukcesoj kaj signifo sur la internacia forumo«.

Červený Kostelec. Esperanta unuigo aranĝas kurson, kiun partoprenas 70 personoj. Oni instruas en burĝa lernejo ĉiumerkrede de la 6—8 h. vesp.

Hradec Král. Stenografia kaj Esperanta rondeto de la 18a regimento aranĝis 9. nov. brile sukcesintan festesperon ĉe kiu kunhelpis la loka militista kapelo.

Karlsbad (Karlovy Vary). La Esp. societo de Karlsbad proponis al la urbestro propagandi la vizitadon de la urbo per Esp. La urbestro akceptis la proponon kaj kune kun la nomita societo aranĝas la propagandon. La urbestro per sia varmtona letero ankaŭ promesis subteni la enkondukon de Esp. en la Karlsbadajn lernejojn.

Reichenberg (Liberec). Tie ĉi fondiĝis ĉeĥa esperantista rondeto »Estonteco«. Prezidanto estas so. Jan Haase (lia adreso: Horní Růžodol u Liberce, Měšťanská ul. 72).

Holešov (Moravio). En la kvara klaso de duagrada lernejo oni instruas Esp. al 14. lernantinoj kaj 4 lernantoj.

Bratislava (Pressburg). La esperantista vivo revigliĝas. La kurso gvidata de malnova fervorulo so. Wanitsek okazas ĉiun mardon de

la 6.—7. vesp. en la urbdomo. Post la kurso okazas amika konversacia kunveno, kie estas kore akceptataj ĉiuj samideanoj. Korespondantojn oni adresu al so. Emil Wanitsek, urba ĉefoficialo (Bratislava, Radnice, Masarykovo nám.).

AL NIA ĈEĤA LEGANTARO!

Per tiu ĉi numero finas la dua jarkolekto de »La Progreso«. Ni memoras la tempon, kiam antaŭ du jaroj ni mobilizis la restojn de bohema esperantistaro por pritrakti la eldonadon de »La Progreso«. Kvankam la gazeto komencis aperadi en tempo tre malfavora, tamen ĝi baldaŭ vekis esperantistaron al nova laboro. Goje ni povas diri, ke »La Progreso« fariĝis posedajo de ĉiuj ĉeĥoslovakaj esperantistoj, penetrinte ne nur en niajn urbojn, sed eĉ en vilaĝojn kaj kaŝitajn angulojn de nia respubliko, kaj ĝi eĉ fariĝis ŝatata kaj multe legata gazeto de tutmonda esperantistaro. La influo de »La Progreso« estas jam tiom grava, ke ĝi eĉ vekas la atenton de niaj registaraj oficoj, kiuj deziras ĝian kunlaboron en eksterlanda informado. Multaj estas tiuj, kiuj kunlaboris kaj kunlaboras por bona prospero de nia gazeto kaj al ĉiuj ni esprimas niajn varmajn dankojn.

Multe da laboro nin atendas kaj nian taskon ni plenumos nur per la komuna laboro. Nia plej proksima celo estas nun la aranĝado de la

XII. universala kongreso de Esperanto en 1921 en Praha! Nia lando fariĝis ideala loko por nia ĝenerala kongreso, ĉar niaj registaraj oficioj estas eksterordinare favoraj al nia afero kaj la bohema esperantistaro estas tre multnombra. Eĉ nia belega ĉefurbo certe allogos la tutmondan samideanaron. Nia XI. kongreso okazos en Haag, ni invitu la XII. en Ĉeĥoslovakion kaj jam nun ni komencu laboron por ĝia efektiviĝo kaj por ĝia plej brila sukceso. B. Tittl.

DE LA ADMINISTRACIO.

La prezo de la presado de nia gazeto atingis tian altecon, ke ni nune pagas por la presado de La Progreso kompare kun tiu en la komenco de la nuna jaro sumon kvarobl an, kaj sekve la nuna jaro alportis al ni gravan deficiton. Por garantii bonan prosperon al nia entrepreno ni estas devigataj plialtigi la prezon de la jara abonamento. — Kroĉoj por Ĉeĥoslovakio kaj 2.50 Svisaj Frankoj por fremdlando. Ni esperas, ke spite la malagrabla plikarigo la ĝismunaj abonantoj restos al ni fidelaj.

Por la administracio: Fr. Kavan.

DEZIRAS KORESPONDI:

So. Aleksandro Spire, Uŝhorod, Ĉeĥoslovakio — deziras korespondi per ilustritaj kartoj, marko bildflanke, kun samideanoj ĉiulandaj. Li certe al ĉiu respondos.

So. Elias Syrjänen (poŝtmarkkomercejo) Ilampilla Murto (Finnlando) interŝanĝas ĉiulandajn poŝtmarkojn.

Via horloĝo iros precize

se vi ĝin donos por rebonigi al



Fr. Novák,

horloĝisto en Praha I. Malé nám. 10.

Magazeno de horloĝoj kaj juveloj. - Vendejo de esper. signoj de Esper. klubo en Praha.

Objednejte si slovník Esperantsko-český

u adm. „LA PROGRESO“ v Plzni.

Cena brož. Kč 4.—, v plátně vázaný Kč 6.80.

Fremdlandaj esperantistoj abonu

LA PROGRESO

ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Bern, Museumstr. 14.

T. & A. BAŤA

ŝuofabrika kaj ledotanejo
ZLÍN-PARDUBICE.

Propraj vendejoj:

Praha, Václavské náměstí 32
Brno, Koblížná ulice 24.
Opava (Troppau), Hrnčířská 14
Wien (Videň), Taborstrasse 17 a
Kraków, Szewska 22

Czernówitz, Rathausstrasse 4
Lwów, Akademicka 5
Łódź, Piotrkowska 74
Bratislava (Presburg), Michalovská 5
Przemysl, Franciskanska 25.

Zlín, náměstí 60.
Mor. Ostrava, nám. 14.
Znojmo, Kovářská 7.
Kroměříž, Komenského nám. 107.
Přerov, Ferdinand. 15
Šumperk, nám. 27/28
Hodonín, Masarykovo 18
Olomouc, Kinopasáž
Val. Meziříčí, náměstí
Břeclava, Frant. Jos. 17
Nový Jičín, obch. dům Jedek
Hranice, náměstí
Vyškov, Pánská 10
Svitava, Brněnská 4
Jihlava, Schillerova 5
Uherský Brod, náměstí 163

Kyjov, Komensk. tř. 4
Místek, náměstí 13
Vsetín, Dolní nám. 304
Kojetín, Masarykovo náměstí
Křtův, Fr. Jos. nám. 12
Frýdek, náměstí
Trenčín, nám., budova gymn. Pisr.
Malacka, Slovensko
Trnava, Hosp. banka
Žilina (Zsolna), Szechenji 209
Nitra, Slovensko
Růžemberok, Slovensko
Užhorod (Kežmark)
Lučenec (Luczivna)
Nové Zámky
Baňská Bystřice (Besztercebánya)

Košice (Kassa)
Liberec, (Reichenberg), Schückerstrasse 34
Pardubice, budova spořitelny
Kolín, náměstí 72
Ústí n./L., (Aussig a./E.) náměstí 28
Hradec Králové, Palác Zál. a úvěr. ústavu
Ml. Boleslav, Pražská ul. 116/1
Jaroměř, Husova tř. 91
Jičín, Velké nám. 60
Čáslav, Palackého 63
Dvůr Králové, nám. 57
Německý Brod, Komenského 153
Turnov, Palackého 145
Plzeň, Zbrojnická 3

Čes. Budějovice, Šternekova 18
Kladno, Královská 38.
Jindř. Hradec, Palackého 94
Příbram, náměstí 142
Tábor, Třída Čes.-sl. legií 640
Písek, Riegrova n. 26
Louny, Žižkova 305
Náchod, Pražská 63
Klatovy, nám. 170/I.
Karlovy Vary (Karlsbad), Fr. Jos. tř. 607
Most (Brüx), nám. 82
Amstetten, Viehdorferstrasse 4
Wner. Neustadt (Vid. Nové Město), Kaiser Wilhelmstr. 64

Esperantia entrepreno. — Oni parolas kaj korespondas esperante.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.